

La Suda Kruro

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 44.

Melburno (Melbourne), Australio.

10 Februaro, 1924.

THE FIRST WOMAN MINISTER AND ESPERANTO.

One at least of the new Labor Ministers in England is favorable to Esperanto. Recently Mr. Mark Starr sent to Miss Margaret Bondfield, now Minister of Labor, then president of the Trades Union Congress, a copy of the pamphlet "Esperanto and Labor," and received from her a very sympathetic reply and a promise to do what she could for the dissemination of Esperanto in Labor circles.

ANOTHER "ZAMENHOF-STREET."

The town council of Kaunas, formerly Kovno, in Lithuania, has decided to rename one of its streets after the inventor of Esperanto. The street chosen has a connection with Esperanto, for in it was the home of Zamenhof's father-in-law, whose faith in Esperanto made possible the appearance of Esperanto before the world.

FRENCH COMMERCIAL BODIES SUPPORT ESPERANTO.

The action of the Paris Chamber of Commerce in recommending the use of Esperanto and having it taught in the schools under its control has set the lead for similar organisations throughout France.

The latest to follow is the Lyons Action of the Committee of Com-

merce, Industry and Agriculture, which, having considered the action of the Paris Chamber and the report of its own delegate to the commercial conference at Venice, has passed a resolution in which it "gives its support to all who are endeavoring to provide the commercial world with a common auxiliary language, decides to become a 'commercial enterprise' of the Universal Esperanto Association, and recommends its members, importers and exporters, to have Esperanto taught to their clerks."

The motion concludes with a reference to "the lucidity of Esperanto, the marvellous ease with which it can be understood, and the extreme rapidity with which it can be learned."

DEATH OF BISHOP GIESSWEIN.

One of the most noted and active supporters of Esperanto has passed away. Monsinjoro Alexander Giesswein, bishop of Gyor, was known, not only in Hungary, but in all Europe as a man of liberal mind and learned in many sciences. His activities included the Presidency of the Scientific Academy of St. Stephen, membership of the Hungarian Parliament since 1905, where he many times pleaded the cause of Esperanto, the representation of the Hungarian Government at the International Esperanto Congress at Antwerp in 1911, membership of the

Hungarian Scientific Academy, presidency of the Hungarian Esperanto Society, membership of the Esperanto Language Committee and of the Konstanta Reprezentantaro, writings in various languages (including Esperanto) on such subjects as Assyriology, comparative linguistics, pacifism and various social questions—all conducted with an amazing energy and profundity which recall his fellow-churchman, Cardinal Newman.

In many Esperanto congresses he took a prominent part, and especially labored to introduce Esperanto into Catholic circles. Into his 67 years of life he compressed several lifetimes of work, and was eminent and distinguished in many spheres.

THE MOVEMENT IN CHINA.

From the excellently-prepared little periodical "La Verda Lumo," published at Shanghai, we note that Esperanto is making serious progress in many parts of China.

The Pekin Esperanto College was recently opened with noteworthy ceremony, and with the assistance of a former Vice-Minister of Education, Mr. Ma Si-Lun, who spoke on the "Abolition of the Natural Wall Dividing the Peoples." The number of students was 170.

In the Shanghai College of the Chinese Language a course of lessons in Esperanto and lectures on the language is being conducted.

In Chang-Sha a summer course of Esperanto has been arranged in the Normal School, as also in the People's University.

The secondary school of Chin-Tan has added Esperanto to its programme.

From various other centres come reports of active interest in the language and of the doings of Esperanto societies. The Orient is not asleep.

AN ESPERANTIST MASONIC LEAGUE.

The Universal Masonic League, whose seat is at Bale, Switzerland, has elected Mr. H. V. Tilbury its representative for Australia. The aim of the league is the rapprochement and reconciliation of Freemasons, and at

present, especially, the reconciliation of the French and the German brethren. The league uses Esperanto in its foreign communications. Those interested are invited to communicate with Mr. Tilbury, whose address is 19 Albert Street, Moonee Ponds, Melbourne.

AN OLD ADVERSARY CONVINCED.

M. Lucien Gautier, the well-known French publicist, writes thus in the "Revue Internationale de la Croix-Rouge":

"I have for a long time been a firm opponent of Esperanto. I considered all attempts at making and using an artificial language to be fallacious and doomed to certain failure. Up to 1914, and even later, this was my outstanding sentiment on the matter.

"But I have been brought to change this opinion. In the first place, during the war, working for the whole duration of hostilities at the Rath Museum agency for prisoners, I have found in written correspondence and verbal intercourse with the supporters of Esperanto that this language had rendered and was still rendering signal service in the hospitals and camps, and that it was the means of doing good to the human race.

"Secondly, the spectacle, which I have not seen, but which I can imagine, of those congresses of hundreds of Esperantists from all parts, happy in understanding each other in spite of all difficulties, impresses me from afar, and inspires me to look upon this matter favorably and with hope."

SIR ROBERT STOUT ON ESPERANTO.

Sir Robert Stout, Chief Justice of New Zealand and Chancellor of the University, has been known for many years as a supporter of Esperanto, and in a University report has expressed himself as follows:

Perhaps the day might not be as far distant as it at present appears when one language will be used for all purposes, just as Latin was once the language for all the learned, and French was and is mainly used for diplomatic correspondence between

tions. If such a time arrives the language chosen will have to be a language belonging to no special nation or people, easily acquired, simple in its construction, uniform in its rules and phonetic in its spelling. We have such a language in Esperanto, and the suggestion has been made that it should be the language of commerce. If this suggestion were accepted, commercial correspondence would become easy, and our commercial men would not have to acquire several modern languages; and, further, one step would have been taken in promoting the brotherhood of man.

HERE AND THERE.

Many Australasian samideanoj will remember Mr. J. A. Brailsford, who, as editor of "Stead's Review," continued in its pages the valuable advocacy of Esperanto which the founder of the review (the late Mr. Henry Stead) had so generously initiated. Mr. Brailsford is now in Japan, and from a report in "La Revuo Orienta" we see that he continues to use a part of his energy for the propagation of nia afero, both in public meetings and in the pages of the daily "Japan Chronicle."

An Esperanto translation of the well-known book on European social conditions by Signor Francesco Nitti, the former Prime Minister of Italy, is announced. For this edition, which will bear the title "Eŭropo ĉe la Abismo," Signor Nitti has written a special introduction.

The municipality of Lederberg (Belgium) has approved of a course of Esperanto in its schools. There are also official municipal courses at Liege.

In the Federal Territory of Brazil the teaching of Esperanto in the schools as an optional subject has been approved.

In Barcelona, members of the police force and of the civil guard are being taught Esperanto.

The International Pharmaceutical Federation has published the report of its committee on nomenclature, in which an Esperanto translation of the Latin terms is given.

The blind residents of Saratov (Russia) having been observed by the authorities to be making much use of Esperanto in foreign correspondence, the language was officially introduced into the curriculum of the schools for the blind in that province.

The Bulgarian Ministry of Commerce is commending to the attention of the chambers of commerce of the country the report of the conference at Venice on the use of a common auxiliary language in commerce.

At the International Sample Fair of Padua the Esperanto exhibit was visited by King Victor Emmanuel, who congratulated the director of the Venetian Institute of Esperanto (Signor G. Saggiore) on the successful adoption of Esperanto by many international commercial organisations.

MALNOVA AMIKO MORTAS.

El "France-Esperanto" ni tiras la jenon:

Emile Berr, la tre fame konita ĵurnalistoj, lasos ĉe la Esperantistoj la memoron de fidela amiko. Oni ne forgesis, ke dum la jaro 1905, ĉe la unua universala kongreso, en Boulogne-sur-Mer, sendita de la direktoro de "Figaro" en la celo ridindigi Esperanton, Emile Berr ĉestis senpartie la kunvenojn kaj estis mirigita de la rezulto, kiun prezentas artefarita lingvo alproksimiganta homojn de malsimilaj idiomoj. Ĉar li estis konscienculo, li sincere rakontis siajn impresojn, kaj verkis pri Esperanto unu el la plej helpaj artikoloj. Poste li restis favora al nia ideo, kaj neniu forgesis la belan artikolon de li verkitan pri la morto de Zamenhof. La ĵurnaliston, la literaturiston laŭdis la parisa gazetaro. F.E. rigardas kiel devon, rememorigi pri tiu malaper-

ĈIU ESPERANTISTO

ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL
THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn. ĈOKOLADOJN PER POŝTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.e., kostas 3ŝ. (aldonu 6p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉokoladojn en kartonoj je 3ŝ 6d ĝis 22ŝ 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne,

anta amiko, kaj saluti la honestan viron, kiu el la unuaj komprenis kaj defendis la noblan celon de nia agado.

KRONIKO.

AŬKLANDO (Nov-Zelando).—Kurso ĉe la instruista lernejo; 40 studentoj. Aliloke en Aŭklando kaj ankaŭ en Whangarei, Dargaville, Nelson, kaj Gisborne sin trovas grupoj.

PALMERSTON NORTH (Nov-Zelando).—Permeso estas donita por nedevisa instruado de Esperanto ĉe la Teknika Lernejo.

MARRICKVILLE apud **SIDNEJO** (N.S.-K.).—Nova grupo komenciĝis freŝdate. Sinjorino A. Scammell membro de la Sidneja Esperanto-Societo, instruas la novajn samideanojn, kiuj kunvenas sabate je la 3-a ĉe la Teozofia Salono, Despointe-strato (apud la Regna ŝparbanko).

MELBURNO (Vik.).—Ni havis plezuron en lasta tempo akcepti du samideanojn el Anglujo: fraŭlino Doris E. Jones, el Birmingham, kaj fraŭlino Williams, el Liverpool, kiuj migris Aŭstralion kaj jam en kelkaj urboj trovis utilon de Esperanto kaj UEA eĉ inter samlingvanoj.

Kelkaj anoj ankaŭ havis la plezuron renkonti la afablan prezidantinon de la Hobarta grupo, fraŭlino Cora M. Hannaford dum ŝia vizito al Melbourne.

Parolado de sinjoro Skurrie pri "Gramatikaj Eraroj" kaj poste vigla diskuto. Parolo de sinjoro Hyde pri ŝia vojaĝo en Oriento.

PERTH (Okcident - Aŭstralio).—Forta reklamado de nia afero per afiŝoj sur stacidomoj kaj aliaj lokoj. Imitinda ekzemplo!

ADELAJDO (Sud-Aŭstralio).—Vigla polemiko en taggazeto "Advertiser," majstre kondukata de sinjoro C. A. Uhrlaub, kaj fortike subtenata de

malnova amiko de Esperanto, kolonelo H. H. Ling.

SIDNEJO (N.S.-K.).—Zorge preparitaj interesaj paroloj de sinjoro Edgar A. Pryke pri la "Kordaj Instrumentoj" kaj de sinjoro Stefano Polotynski pri Polujo. Oni en Sidnejo havas vere bonan programon.

B. E. S.-a ADRESARO.

De la agento, sinjoro A. R. Cohen, ni ricevis ekzempleron de la kvina eldono de la adresaro de la Bohema Esperanto-Servo. Kvankam ne granda, ĝi enhavas adresojn de samideanoj en ĉiuj mondpartoj, kaj nepre povas multe helpi al ĉiuj serĉantaj rilatojn kun alilandanoj. Tre saĝa kaj necesa estas la admono de la eldoninto: "Ne ĝenu senbezone homojn, kiuj ne deziras korespondi." La libreto estas zorge preparita kaj meritas plenan sukceson.

De sinjoro Gerhard Haeufel en Freital bei Dresden alvenis letero destinita al iu korespondanto, kies nomon li tamen ne skribas. La rajta posedanto de la letero povas ĝin ricevi ĉe la sekretario de AEA.

VI KANTIS.

Vi kantis. Mi aŭskultis kun atento, kaj via kant' en tiu bela hor' ensorĉis min kun forto de torento, Sonadis ĝi pri am', pri vera sento, kaj tial ĝin komprenis mia kor'

Vi kantis. Mi rigardis kun atento, kaj mia rav' senvole iris for . . . Ho, kiel, do,—mi pensis en silento,—ĉe tiu kant' kun tiel bela sento eksoni povas el la ŝtona kor'?

V. Jarmoloviĉ.

Hall's Book Store

'Phone: Windsor 6081.

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

264 CHAPEL STREET
PRAHRAN

(Opposite Town Hall.)

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

POTENCO DE L'AMO.

re bela nun ŝajnas la mondo al mi,
ĉe la suferoj pro la vivbatal'.

mi ĵus foriris malam' kaj envi',—
mi amas amate: jen sola kial'.

Otello Nanni.

"INSTRUO SENPAGA."

Mi demandas min, ĉu tio estas la plej bona metodo. Efektive, unu konsilo eldirita ĉe la Nurnberga kongreso estis, ke la kursoj ne plu estu senpagaj, t.e., ke oni postulu pagon de la lernantoj, kiel de lernanto de aliajn alia lingvo.

Ĉu la diligenta, sindona laborado de tiaj instruantoj, monaton post monato, jaron post jaro, donas la rezultojn, kiujn ni rajtas atendi? Ĉu la lernantoj taŭge profitas tiun senpagan instruadon, kaj baldaŭ fariĝas kapablaj kaj korektaj uzantoj de la facila lingvo, ne plu bezonante instruon?

Al mi ŝajnas, ke ne. Tro malmultaj tiaj lernantoj vere akiris la lingvon, tiel, ke ili povas ĝin facile kaj korekte uzi; kaj oni devas konsideri, ke la plej bonaj esperantistoj estas tiuj, kiuj instruis sin mem per regula studado, ne kredante, ke vizito al grupo unu fojon en semajno iel, travazaŭ magie, inokulos al ili plenan scion de la lingvo.

Pri tiu rezulto ne estas tute kulpaj la lernantoj. Ili trovas entuziasmajn sed ofte nespertajn instruantojn; la kursoj devas sidi po kelkaj en unu ambro (ĉar la esperantaj societoj ne estas riĉaj kaj ne disponas profesiajn instruistojn kaj moderne meblitajn lernejojn); la bruo de unu kurso malhelpas la aliajn; oni interrompas la kursestron kaj kursanojn por paroli pri aferoj de la societo; kaj entute mankas la trankvilo bezona por sukcesa studo eĉ de nia simpla lingvo.

Kaj la gvidantoj de kursoj: ĉu ili ankau ne rajtas plendi? Mi ne parolas pri frivolaĵ lernantoj (aŭ, pliĝuste,

kursanoj, kiuj ne lernas), nek pri kursanoj, kiuj eĉ ne rigardas la lernolibron de unu kunveno ĝis alia, nek pri tiuj, kiuj postulas lingvistikan kaj filologian pravigon de ĉiu detaleta de la lingvo, dirante, ke estas granda domaĝo, ke Zamenhof ne faris la lingvon tiel aŭ alie. Feliĉe la lasta speco estas jam malofta. Sed tutvespera instruado eĉ de plej diligenta kurso ne estas ĉiam laŭ la gusto de ĉiu esperantisto bone ellerninta la lingvon. Tro ofte tamen tio estas la sola rekompenzo, kiun oni povas proponi al sukcese studinta societano. Por plua memvola studo, por diskutado de lingvaj punktoj kun samnivelaj aŭ pli spertaj samideanoj, eĉ por simpla ekzerco en esperanta konversacio ne restas okazo. Ne; sinjoro A. ellernis la lingvon, li do devas instrui kurson.

La solvo ŝajnas esti, ke ni disigu la instruadon, almenaŭ la elementan instruadon, de la ordinaraj kunvenoj de la societoj. La kurso, kie oni lernas la lingvon, kunvenu en alia loko aŭ tempo, ol la societo, kie oni ekzercas kaj uzas la lingvon. Kiel instruiston oni elektu. . . instruiston, t.e., iu posedanta la arton de instruado; se eble, profesia instruisto. Profunda scio de Esperanto ne estas bezona; sed kapablo instrui estas nepra kondiĉo.

De la lernantoj oni postulu pagon, kiel por instruado de Franca aŭ Germana lingvo; kaj parton de la ricevita pago la societo povas doni al la instruisto. La societo rezervu al si la rajton, eksigi el la kurso frivolaĵajn aŭ nediligentajn lernantojn; tio eble ŝajnas severa, sed ĉiu serioza lernanto estos danka kaj povos pli bone lerni pro ilia foresto.

Kaj la lernantoj rajtu veni al la societa kunveno, aŭdi la paroladojn, partopreni la distraĵojn, peti helpon pri malfaciloj . . . sed ili ne rajtu monopoligi la tutan tempon, energion kaj talenton de la progresintaj grupoj. Kaj la societaj kunvenoj povos esti pli interesaj, pli vivaj . . .

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

kaj oni aŭdos pli multe da Esperanto ĉe ili.

Kion vi opinias pri tio, sinjoroj instruantoj? Ni volonte ricevus kaj presus viajn opiniojn.

PRI POLUJO.

Parolo de Pola Samideano.

[Alta plezuro estis por la anoj de la Sidneja Esperanto-Societo antaŭ kelke da semajnoj, aŭdi de jam bone konata Pola samideano, sinjoro Stefano Polotynski, interesan parolon pri sia patrolando Polujo. Eltiron el la parolo ni ĉi tie preŝas.

Sinjoro Polotynski, komponisto kaj ĵurnalisto, estas esperantisto de post 1908. En sia naskurbo Krakovo li partoprenis la organizon de la oka tutmonda kongreso de Esperanto, ĉe kiu doktoro Zamenhof donaciis al li kelkajn manuskriptojn en Esperanto kiel memoraĵojn.

Dum la milito sinjoro Polotynski estis leŭtenanto kaj orkestra direktanto en la Pola armeo. Dum mallibereco en Siberio li propagandis Esperanton meze de militkaptitoj de diversaj nacioj. Tamen de post 1918 la politika situacio en Siberio pli malboniĝis, kaj la terura batalado inter la Blanka kaj la Ruĝa Gvardioj ĉesigis kulturen progreson.

En 1919, saviĝinte de mortpafado, nia samideano, post aventuroj kaj longedaŭra vojaĝado en centra Azio alvenis Ĥarbinon (Norda Ĉinujo). De tie li projektis rondvojaĝon kune kun amiko-samideano tra Azio, Aŭstralazio, Hindujo k.t.p. kun koncertoj kaj propagandaj paroloj pri Esperanto. Tamen, pro la morto de lia edzino kaj malsaniĝo de la amiko, la projekto devis esti forlasita. Sekve de Ĉina anarkio kaj la lastaj travivaĵoj, sinjoro Polotynski decidis veni al Aŭstralio, kaj estas jam bone konata en la muzika kaj gazeta mondo de Sidnejo.]

Proksimume 150 jaroj pasis de kiam la Pola Reĝlando, unu el la plej fortaj potencoj dum la mezepoko, mal-supreniĝis. Tamen la juĝo de l' destino redonis nian landon en la manojn de nia libera popolo, kaj hodiaŭ la blanka-ruĝa standardo de la Pola respubliko restas sur la Pola teritorio kaj nepre devos resti ciamdaŭre.

Polujo, kiu ekzistis kiel sendependa reĝlando dum kelkaj jarcentoj, estis unufoje potenco egala kun Rusujo, havante okcidentan civilizacion. Ĉirkaŭitaj de malamikaj potencoj, nome Germanujo, Rusujo kaj Aŭstrujo, Poloj ne povis longe sin defendi, kaj kiam ili troviĝis en malforta interna situacio, la malamikaj potencis atakis kaj distrancis nian landon.

Polujo estis trifoje distrancita. Post la tria fojo, en 1795, la nomo de Polujo malaperis el la listo de liberaj ŝtatoj de Eŭropo. Al nia nacio alvenis gravaj tempoj de mallibereco. Niaj subpremantoj, Germana kaj Rusa registaroj, decidis detrui nian nacieron, ĉar ili sciis, ke alie ni neniam forlasos la ideon de sendependeco. Ili fermadis Polajn lernejojn, malpermesadis uzadon de la Pola lingvo, ordonante uzi la Germanan aŭ Rusan, ili devigis nin akcepti ilian Ortodoksan religion kaj aliajn iliajn morojn.

Tamen . . . ili grave eraris. Tia subpremado nur pligrandigis nian patriotismon kaj esperon, ke baldaŭ devas veni la horo de nia reviviĝo, kaj ke ni denove trovos egalan lokon meze de liberaj nacioj.

Kompreneble, ni atendis la plej taŭgan momenton por liberigi nin, ĉar ni ne povis batali ĝentile kontraŭ tiaj tri potencoj, kiaj estis Germanujo, Aŭstrujo kaj Rusujo.

Kaj tia momento okazis fine dum la lasta granda milito. Terura revolucio skuis Rusujon kaj Aŭstrojn aperis senpotenca, kiam Germanujo ne povis helpi ĝin plue, ĉar sama Germanujo uzis tiam siajn lastajn fortojn por defendi sin.

B.E.S.—ADRESARO

5th Edition now to hand, 1/-.

6th Edition: Register your name among the Esperantists of the world.

Price, 1/-.

Australian Agent: A. R. Cohen, 55 Hawthorn Grove, Glenferrie, Vic.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See testimonials.

For children and adults.

Price per packet: 3/8 posted.

Agent: A. R. Cohen, 55 Hawthorn Grove, Glenferrie, Vic.

Tia momento okazis la 11-an de novembro 1918, kiam tiranaj malamiĝintaj armeoj okupantaj Polan teritorion estis senarmigitaj kaj la Pola standardo kun la blanka aglo ondiĝis super la Pola tero.

Mi neniam forgesos tiun momenton. Mi servis tiam kiel leŭtenanto de la Pola legio en frosta Siberio, 5000 mejlojn for de mia lando. Niaj bataletoj tie estis plenaj de espero, ĉar ni komprenis, pro kio ni batalas kaj batalas, kaj de post tiu momento ni komencis, pro kio ni batalis.

Polujo estas hodiaŭ la kvina ŝtato en Eŭropo laŭ la areo kaj la kvina laŭ la loĝantaro (ĉirkaŭ 30,000,000). Hodiaŭaj Poloj estas naciokonstruantoj. Ni certe havas multajn erarojn... sed kia nacio ekzistas sen eraroj? Nomoj de famaj Poloj estis, estas kaj estos konataj preskaŭ en ĉiu branĉo de scienco: sinjorino Curie-Skłodowska, fama eltrovinto de l' radiumo; Chopin, Paderewski kaj liaj famaj muzikistoj; Johano Matejko, pemtristo; poetoj kaj verkistoj kiel Mickiewicz, Slowacki, Krasinski, Wyspianski, Sienkiewicz; Konrad Korzeniowski, kiu verkas nun en Londono sub la nomo "Joseph Conrad," kaj estas tie rekonata kiel unu el la plej bonaj hodiaŭaj Anglaĵ verkistoj. Pola literaturo, kiu enhavas du-trionojn de tuta Slava literaturo, estas tiel malnova kiel la Pola ŝtato kaj nacio. La universitato en Krakovo, antikva ĉefurbo de Polujo, estas unu el la plej malnovaj en Eŭropo.

Nikolao Kopernik (Copernicus), fama Pola astronomo, estis la unua, kiu eltrovis kaj argumentis, ke la tero moviĝas ĉirkaŭ la suno. Johano Sobieski, Pola reĝo kaj heroo, detruis turkan armeon apud Vieno en 1683, berigante Eŭropan civilizacion de la terura minacanta sorto. Tadeo Kosciuszko, batalis pro libereco de Polujo kaj de Usono; per lia nomo la alia Pola scienculo, generalo Strzelecki,

nomis la plej altan monton en Aŭstralio.

Ni Poloj neniam forlasis la esperon estis liberigitaj. Nia nacio ekribelis kvinfoje dum la centkvindekjara mallibereco, pleje kontraŭ la Rusa regado, sed ĉiuj ribeloj estis subpremataj. Prave diris unu Angla ŝtatisto, ke Poloj posedas multajn talentojn, sed eble la plej rimarkinda estas nia daŭrinta kredo en pli bona destino por nia lando.

En la nacia muziko de Polujo la animo de la nacio rebrilas per tuta sia individueco kaj multoblaj lumoj kaj nuancoj, bazite sur la originala romantikismo kaj natura talento de esprimado. La muziko de nia plej fama komponisto, Frederiko Chopin, posedas puran Polan karakteron, kun aldonita melankolio, kiun kaŭzis la plej ĉagrena pozicio de nia subpremata nacio dum la vivo de ĉi tiu muzika poeto. Kiam Francisko Liszt, alia komponisto, aŭdis la "Funerbran Marŝon" de Chopin, li diris: "Nur Poloj povis krei tian marŝon, kiu ŝajnas prezenti la funebran kriadon de la tuta nacio kontraŭ la maljusteco de l' destino."

Kaj laste: nia nacio naskis la genian kreinton de la lingvo kaj ideo Esperanto, doktoro L. Zamenhof.

Tutkore mi esperas, ke nia nacio, estante nune liberigita, progresos kun duobla energio, kaj donos pli multajn pruvojn, ke ni meritas esti liberaj, libere pensi kaj libere verki.

At a meeting of railwaymen and other transport workers, held at Rotterdam, Holland, it was voted to encourage the use of the international language, Esperanto, among railwaymen, tramway men, seamen, and transport workers of the world. A committee was appointed to inaugurate a campaign with this purpose in view.—(From the journal of the Victorian Railways Union.)

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
BONA ODORA SPIRO
BONA RIDO
BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 7a januaro ni ricevis la jenajn sumojn: C. W. Ballard, 4/6, ĝis decembro 1924; Bela Szepessy, 5/-, decembro '24; T. O'Leary, 4/6, novembro '24; P. Parker, 4/6, novembro '24; C. Caine, 4/-; kontantaj, 7/-.

ANONCO.

Al miaj korespondantoj: Bonvolu resendi viajn adresojn. Miaj biblioteko kaj adresoj forbrulis en granda fajro en Rabaul. Mihaelo Ahang, Box 34, Rabaul, Nov-Gineo (New Guinea, via Australia).

GAZETOJ RICEVITAJ.

Libero, nov.; La Verda Lumo, aug.-dec.; La Revuo Orienta, dec.; Amerika Esperantisto, nov.; Brazilia Esperantisto, junio-sept.; France-Esperanto, dec.; British Esperantist, dec.; Esperanto Triumfonta, n-roj 166, 7, 8, 9, 171, 2; Bulgara Esperantisto, nov.; Belgia Esperantisto, sept.-okt.; Sennacieca Revuo, dec.; La Interligilo de I' P.T.T., dec.; La Lumturo, 6, 7.

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A. E. A.
(Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wellington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso, "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburna Sekcio de A.E.A.: Vicprezidanto, S-ro H. Byatt; sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth str. P.O., Melbourne. Kunveno: Hardware Chambers, 350 Little Collins Street, vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunveno kaj poŝta adreso: ĉe F-ino. P. Ab-

bott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, ĵaŭde je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Society.—Prezidanto, S-ro. Alfred Gregory. Sekretario, S-ro. R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunveno: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno Eaton-Bray-lernejo, Davey St., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino. C. M. Hannaford. Sekretaria kaj poŝta adreso F-ino. A. Beckett, 177 Davey St., Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunveno: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Kunveno kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl St., Murrumbena, (du domojn for de la Carnegie Kinema-teatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey, Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Kunveno, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier St. ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro. H. Byatt, Sekretariino: F-ino. I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta.—Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunveno: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.